

# La Progreso

REDACTIE-  
COMITÉ

G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
W. F. KRUIT

STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 331133

H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
H. VAN LIER  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## MANIERO – GRADO – KVANTO

Diversaj gramatikaj demandoj formas regule temojn de lingvaj diskutoj en la Esperanta gazetaro. La pli multaj demandoj estiĝis post la morto de Zamenhof, pro kio ne ekzistas eblo informiĝi pri la opinio de la Majstro mem koncerne la diskutatajn aferojn Tio estas bedaŭrinda, ĉar, kvankam Zamenhof neniam altrudis aŭtoritaton, liaj adeptoj ĝenerale volonte akceptis liajn konsilojn. Estus tre interese scii la opinion de la Majstro pri la afero „kiel-kiom”. Per tiu nomo ni celas la demandon: kiaj estas la precizaj signifoj de la *iel-* kaj *iom-*korelativoj? La praktiko de Zamenhof mem ne donas al ni solvan respondon. Pro tio ni povas eĉ ne pale konjekti kia estus lia respondo pri la demando.

Ĉu estas dezirinde solvi ĝin? Ni mem ne opinias la aferon tiom grava, sed ni scias, ke por pluraj esperantistoj la du-eco *iel-iom* por unu signifo estas ĝena afero, kaj ili deziras solvon, kia ajn ĝi estos.

Sed jen alia demando: ĉu decida solvo estas farebla? La Lingva Komitato estas la sola kompetenta institucio por decidi ion sur lingva tereno. Ĝiaj decidoj konsistas en fortaj rekomendoj aŭ konsiloj. Sed, ĉu koncerne la ĝustajn signifojn de *iel* kaj *iom* L.K. povas iamaniere decidi? Ni konstatas, ke Zamenhof mem ne agis laŭ fiksitaj regulo. Eventuala konsilo de L.K., kia ajn ĝi estus, do signifus samtempe, ke ĝi malrekomendas la alian formon, ankaŭ uzitan de Zamenhof.

Por veni al objektiva juĝo ni antaŭe konsideru, ke ni disponas pri du serioj da korelativoj por indiki tri signifojn. La du serioj estas la *iel-* kaj la *iom-*vortoj. La tri signifoj estas la *maniera*, la *grada* kaj la *kvanta*.

Manieron oni ĝenerale aplikas ĉe ago: *tiel labori, kiel traduki, iel elpensita*; malpli ofte ĉe kvalito *iel ĉarma, neniel rapida*.

Gradon oni ĝenerale aplikas ĉe kvalito: *tiom (tiel) bona*, malpli ofte ĉe ago. Adjektivoj de mezuro (*dika, granda, alta, profunda* k.s.) postulas preskaŭ nur gradon: *tiom (tiel) dika*.

Kvanto estas substantiva ideo, sed en Esperanto ofte esprimata per adverbo: *iom, tiom, multe, sufiĉe*. Kvantesprimo ĉiam postulas post si la prepozicion *da*: *iom da mono, kiom la homoj*.

Car ni disponas pri nur du serioj da korelativoj por tri signifoj, neniu solvo povas esti perfekta. Ni konstatas, ke por la maniera signifo oni uzas ĉiam *iel*, kaj por la kvanta ĉiam *iom*. La temo de diskutoj estas do nur: ĉu la signifo grada postulas *iel* aŭ *iom*?

Ni nun konsideru la uzadon de Zamenhof mem:

Regule Zamenhof uzis *tiel* kaj *kiel* por du signifoj: grada kaj maniera (*kiel mi solvis la problemon; li kuris, kiel rapide li povis; mi estas tiel forta, kiel vi; kiel eble plej bonaj*).

En kelkaj specialaj esprimoj Zamenhof preskaŭ regule uzis *tiom* kaj *kiom* por gradaj signifoj, kaj *tiel*, *kiel* estas ekceptoj (*tiom pli gaja estos; la muziko plaĉis al mi tiom pli, ke*).

Sed rimarkinde estas, ke Zamenhof neniam uzis la nedifinitan korelativon *iel* por grada signifo, sed ĉiam *iom* (*laboro iom pli malfacila; la forno estis nur iom varmeta; iom-post-ioma*).

Koncerne la gradan signifon ni do konstata, ke Zamenhof uzis: *tiel* kaj *kiel* en la pli multaj ordinaraĵoj okazoj;

*tiom* kaj *kiom* en kelkaj *iom* specialaj okazoj;  
*iom* regule por la nedefinita signifo.  
Zamenhof do agis *iom* regule, sed lia uzado estis nekonsekvencan.

Antaŭ dudeko da jaroj kelkaj aŭtoroj, konstatinte la nekonsekvencan uzadon de Zamenhof, komencis apliki la *iom*-vortojn konsekvence por la signifo grado: *tiom bela*, *kiom alta*, do konforme al la zamenhofa uzo *iom alta*, sed kontraŭe al la zamenhofa *tiel bela*. Supozeble ili konsideris la signifon grado pli parenca al kvanto ol al maniero.

Poste aŭdiĝis kontraŭ tiu nova uzado voĉoj de aliaj esperantistoj, kiuj postulas la *iel*-vortojn: *kiel bela*, *tiel alta*. Ili opinias, ke la *iel*-korelativoj indikas ne nur manieron, sed ankaŭ gradon. Sendube ili konkludas tiel laŭ la zamenhofa uzado de *tiel kaj kiel*. Sed, same kiel la antaŭe aluditaj aŭtoroj, ankaŭ ili povas bazi sian opinion nur sur parto de la zamenhofa uzado (*tiel bela*), ĉar ilia opinio kontraŭas la zamenhofan uzadon de *iom*-vortoj en *iom alta*, *tiom pli gaja* k.s.

Ni do konstatas, ke neniu el ambaŭ partioj plene povas pravigi sin per la zamenhofa uzado. La rimarko, ke la *tiel*-uzado ĉe Zamenhof laŭnombre superas lian *iom*-uzadon, ne estas argumento, ĉar la esprimoj *tiel kaj kiel* en la lingva uzado ĉiam multe superas la esprimojn *iom kaj tiom pli*. Kiel ajn ni do decidus, ĉiu solvo konformus nur al unu uzo de Zamenhof, kaj per tio kontraŭus la alian. Se ne ekzistus alia vojo, ni konsiderus ambaŭ formojn: *tiel kaj tiom* egale bonaj por la grada signifo.

Sed efektive ekzistas ankoraŭ io: *tiel* kaj *kiel* estas senĝene anstataŭigeblaj per *tiom* kaj *kiom*. Sed, skribante *iel*

*alta* anstataŭ *iom alta*, oni enkondukus esprimon ankoraŭ neniam uzitan kaj nepre kontraŭan al la zamenhofa uzado de *iom*. Konsiderante tiun fakton, ni opinias, ke, se oni por si mem deziras solvi la aferon, la vojo al solvo pli kondukas al *tiom* ol al *tiel*.

Ni diras: „por si mem“, ĉar el ĉio antaŭe dirita oni facile komprenas, ke oni neniam rajtas trudi al ni unu specialan formon, ĉar trudo de unu formo signifus kondamnon de l' alia, t.e. kondamnon de unu aŭ alia formo de Zamenhof mem.

Ni finu tiun ĉi temon, pruvante per ekzemplo, ke la *iom*-uzo de Zamenhof logike nepre kondukas al *tiom*-uzo:

*Iu turo estas alta 100 metrojn.*

*Alia turo estas iom pli alta.* Oni certe ne povas diri: *iel pli!*

*Kiom pli* (certe ne: *kiel pli!*) *alta ĝi estas?*

*Ĝi estas 10 metrojn pli alta.*

*Oni do scias kiom pli alta ĝi estas; kaj per tio scias ankaŭ: kiom alta ĝi estas.*

Aŭ ĉu ni devus uzi en la unua frazo *kiom pli alta*, sed en la dua *kiel alta?*

Uzo de *kiom pli* ja sufiĉe pravigas ankaŭ uzon de *kiom*, kaj estus nekonsekvence uzi la jenajn diferencajn formojn:

*La turo estas alta kiel....*

*La turo estas tiom pli alta kiom....*

Tiu ĉi ekzemplo ŝajnas al ni sufiĉa pruvo, ke la *iom*-korelativoj logike havas la signifon de grado, eĉ senkonsidere al la fakto, ke la ideo grado (kvanto de kvalito) estas pli proksima al la ideo kvanto ol al la ideo maniero.

Ni povus ankoraŭ aldoni, ke la zamenhofa uzado de la *kiel*-vortoj estas multe pli vasta ol la logiko postulas. Ofte Zamenhof uzis *kiel* por la signifo *kia* (*kiel ajn la afero estas*). Kaj precipe pro sia ofta konjunkcia senco *kiel* perdis sian puran signifon (*konsideri ion kiel veron*).

## POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Overgankelijke en onovergankelijke werkwoorden. (IV)

Er zijn achtervoegsels die slechts achter overgankelijke werkwoorden gevoegd kunnen worden.

Het achtervoegsel EBL heeft de betekenis van: wat kan worden.... (gezien, gehoord, gevoeld, gerepareerd, en voorts alle overgankelijke werkwoorden). In Esperanto zegt men: *videbla, aŭdebla,*

*sentebla, riparebla* enz. Met andere woorden, *ebi* betekent: dat de mogelijkheid bestaat iets te zien-*vidi ion*, iets te horen-*aŭdi ion*, iets te voelen-*senti ion*, iets te repareren-*ripari ion*. Het woordje „ion“ in deze voorbeelden is een rechtstreekse bepaling, vandaar de N, de betreffende handelingen gaan op dit woordje over. Nog enige voorbeelden: *Tiu libro ne estas legebla*-Dat boek is niet te lezen. *Porcelano estas rompebla*-Porselein is te breken. *La plumo ne estas uzebla*-De pen is niet te gebruiken.

Van de onderwerpen in deze zinnen wordt dus gezegd, dat zij de handelings-

gen *legi, rompi, uzi* kunnen ondergaan, bijv.: *Oni povas legi la libron, . . . rompi porcelanon, . . . uzi la plumon.*

Het achtervoegsel „*ebi*” kan dus niet voorkomen achter onovergankelijke werkwoorden, want men kan niet zeggen dat een onderwerp bij een onoverg. werkwoord een handeling kan ondergaan.

In het Nederlands zegt men ook wel in plaats van te lezen, te breken en te gebruiken, leesbaar, breekbaar, bruikbaar. Men late zich echter bij het vertalen niet leiden door dit Nederl. achtervoegsel, want dit komt ook voor bij onovergankelijke werkwoorden en leidt dan op een dwaalspoor. Dit is bijv. het geval met de woorden: *brandbaar, vloeibaar, strijdbaar, feilbaar, bestaanbaar, schijnbaar*, enz. Deze woorden vertalen men dus niet met behulp van het achtervoegsel *ebi*, want de werkwoorden: *brand, vloeien, strijden, feilen, bestaan*, en *schijnen* zijn, in Esperanto vertaald, onovergankelijk. Men vertale deze woorden als volgt: *bruligebla* (*bruli* is hier overgankelijk gemaakt met „*ig*”), *fluida, batalpreta, eraripova, ekzistipova, ŝajne*.

Deze gevallen komen ook voor bij het Nederl. achtervoegsel „*lijk*”. Men kan bijv. zeggen: *Tio estas akceptebla* — Dat is aannemelijk, maar moet men vertalen *sterfelijk*, dan heeft dit achtervoegsel een andere betekenis, want *sterven* (*morti*) is onovergankelijk; dit wordt vertaald met *mortideva*.

Opmerking: de woorden *eraripova* en *ekzistipova* zijn correct, doch lelijk. Meestal kan een vloeibare vorm gebruikt worden, bijv.: *Onfeilbare mensen zijn onbestaanbaar* — *Ne ekzistas homoj, kiuj ne faras erarojn*.

In een volgend nummer zullen wij een ander achtervoegsel behandelen.

Ter vertaling. Opgave 10.

Zijn redevoeing was nauwelijks te horen. Deze kolen zijn niet te branden. Alle mensen zijn feilbaar. Schrijf niet zo onleesbaar! Mijn schrijfmachine is draagbaar. Men bracht de gewonde op een draagbaar weg. Door de vele regen is deze weg onbegaanbaar. Het landschap is onbeschrijfelijk mooi. Schijnbaar is hij alles vergeten. De drenkeling was niet te redden. Door het vele oefenen werd hij ongelofelijk handig in het vertalen. De zieke leed ondraaglijke pijn.

Vertaling van opgave 8.

La flugiloj1) de la muelejo2) rapide turniĝas. Pro ektimo3) la knabino rompis la glasojn. Pro la multaj libroj la breto fleksiĝas. La aktoroj komencos sian4)

ludon5) je la oka horo6). La ĉaroj7) ruliĝis8) sur9) la strato. La sekretario finis sian raporton per10) kelkaj instigaj vortoj. Pro11) la malbona vetero la planoj12) ŝanĝiĝis. Oni rulis la barelojn flanken13). Pro la varmeĝo oni ŝanĝis14) la programon. Je la deka horo la prezentado15) finiĝis. La instruisto turnis16) la tabulon. Ĉe17) tiu domo la vojo finiĝas18). Fleksu19) la feron, kiam ĝi estas varmeĝa. Pro la ventego la fenestrovitro rompiĝis.

1) Ook: *brakoj, aloj*. 2) Niet: *muelilo*; d.i. de maalmachine in de molen. Niet: *la muelo*; d.i. de handeling zelfstandig voorgesteld n.l. het malen. 3) Wat te sterk is: *teruro, konsterniĝo*. Niet: *timo*; d.i. angst; er is hier sprake van een kortstondige handeling. Niet: *la ektimo*; het lidwoord is hier overbodig. 4) Niet: *ilian*; het bezittelijk voornaamwoord heeft hier betrekking op het onderwerp, dit is 3e persoon, dus *sia*. 5) Ook: *prezentadon, teatraĵon*. Niet: *siajn ludojn, teatraĵojn*; hier is geen sprake van meervoud. 6) Ook: *la okan horon*. 7) Ook: *veturiloj*. 8) Niet: *rulis; ruli* is een overgankelijk werkwoord; dit moet in onze zin onovergankelijk gemaakt worden door „*ig*”. Zie vooral de voorbeelden in „La Pr.”, Sept. 9) Ook: *tra*, waarbij men dan denkt aan het gaan tussen de huizenrijen. Niet: *trans*; d.i. over, bijv.: *Per la ponto ni iras trans la kanalon*. 10) Niet: *kun*; vergelijk: *fini la raporton kun entuziasmo per instigaj vortoj*. 11) Niet: *per*; d.i. door middel van. 12) Ook: *intencoj*. 13) Niet zonder richtings N. 14) Niet: *ŝanĝis*; *ŝanĝi* is overgankelijk, behoeft dus niet overgankelijk gemaakt te worden. Vergelijk: *Oni ŝanĝis la programon. La programo ŝanĝiĝis*. Bestudeert vooral de lessen in de voorafgegene nummers nog eens. 15) Minder juist: *reprezentado*; dit gebruike men voor het begrip *vertegenwoordigen*. 16) Niet: *turnis aliflanke*; dit is voor verschillende uitleggingen vatbaar, *turni* zegt reeds, dat de andere kant naar voren komt. 17) Ook: *apud*. 18) Niet: *finas; fini* is een overgankelijk werkwoord en moet in onze zin onovergankelijk gemaakt worden door „*ig*”. Leert van buiten: *Mi finas la laboron — la laboro finiĝas*. 19) Niet: *fleksas*; hier moet de gebiedende wijs gebruikt worden. 20) Niet: *se*; *se* betreft een voorwaarde, bijv.: *Se (indien) vi diligente studos, vi sukcesos*. Maar: *Kiam (wanneer) mi havos tempon, mi venos*.

Astor 10, C.v.B. te M. 7, G.A. te R. 10, J.R. te A. 9, Stelano 6, L.H.P. te R. 9, A.A.D. te Z. 9, A.B. 10, P.W.W. te G. 6, C.v.S. te R. 7.

# DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 11. Vertaal in Esperanto:  
EEN BEZOEK AAN DE AMSTER-  
DAMSE DIERENTUIN (Vervolg).

Pythons (*pitonoj*), boa's en andere slangen liggen onbeweeglijk of kruipen traag (voort) achter de vensterruiten van hun verblijven. Men kan zich bijna niet voorstellen, dat die trage wezens zo uitermate gevaarlijk kunnen zijn. Slangen hebben onbeweegbare oogleden, zodat zij de ogen niet kunnen sluiten. Die ronde, starende (*fiksrigardantaj*) ogen geven aan de platte, betrekkelijk kleine kop een spookachtig aanzien (*aspekto*). Het is nauwelijks te geloven, dat een grote slang een hoender, een konijn, een jonge bok of iets dergelijks kan doorslikken (*engluti*). Want de prooi wordt niet gekauwd, maar met haren of veren en al doorgeslikt. De scherpe, puntige, achterwaarts gerichte (*posten (malantaŭen) direktingintaj*) tanden maken het mogelijk, dat de prooi naar binnen kan glijden, maar verhinderen het gevangen dier zich terug te trekken. De gespleten (*fendigitaj*) lippen en de door elastische pezen met elkander verbonden (*interligitaj*) kaken stellen de slang in staat de mondruimte geweldig te verwijden. Ook de slokdarm (*ezofago*) is zeer elastisch. Met kleine schokjes (*kun skuetoj*) glijdt het slachtoffer langzamerhand naar binnen. Als de prooi wat dik is, kan het gebeuren, dat dit proces (*procedo*) zelfs enkele uren duurt. Maar, vraagt gij misschien, stikt de slang dan intussen niet? Neen, een benige ring verhindert het dichtdrukken (*fermpremado*) van de luchtpijp (*traheo*), die tijdens (*dum*) het inslikken van de prooi als een buis uit de bek van de slang hangt. Omtrent slangen bestaat veel misverstand. Sommige mensen menen, dat de gespleten tong, die de slang telkens weer snel uitsteekt (*elŝovas*) en weer intrekt (*retiras*) een engel (*pikilo*) is. Een slang heeft geen engel. Met de tong tast zij. Niet alle soorten slangen zijn, zoals velen menen, giftig. Slechts weinig soorten bezitten giftanden. In zo'n tand bevindt zich een buisje, dat in verbinding staat (*komunikigas*) met een gifklier. Onder (*pro*) de druk van de beet vloeit uit het buisje in de tand een druppel gif in de wond. Slangengif is zeer gevaarlijk, vaak zelfs dodelijk. Als men door een gifslang is gebeten, is onverwijld (*senprokrasta*) geneeskundige hulp dringend gewenst. De enige in Nederland voorkomende (*trovigitaj*) gifslang is de adder (*vi-pero*). (Wordt vervolgd).

Vertaling van opgave 10.

VIZITO AL LA AMSTERDAMA  
ZOOLOGIA GARDENO (Daŭrigo).

Kiu sin interesas (interesigas) pri la vivo de la insektoj, ne forgesu viziti la insektarion. Tie ni povas vidi ĉiajn (ĉiuspecajn) en- kaj eksterlandajn (enlandajn kaj ekzotikajn) insektojn en la diversaj stadioj de la metamorfozo. Atentu, kiel la mistera mirmeleono, larvo de ia libelo, kaŝita en sablokaveto, tiel ke ĝi estas apenaŭ videbla, de tempo al tempo suprenpafas sableron por trafi formikon aŭ alian malgrandan insekton, kiu iras sur la deklivo de la kaveto. Trafite de tia kugleto, la formiko rulfalas malsupren; ĝi klopodas suprengrimpi. Denove (ree) kugleto trafas ĝin; denove ĝi malsuprenfalas, ĝis kiam fine la teruraj makzeloj de ĝia insidanto kaptas ĝin.

Kiom ruza estas tiu mirmeleono, vi eble opinias. Tamen, tio ne estas ruzo; la mirmeleono ne celkonscie atendas la kaptajon por malsuprenpafi ĝin. Ĝi agas nur laŭ sia natura instigo. Ankaŭ, se neniu insekto troviĝas apud (en) la najbareco de, en la proksimo de) la kaveto, ĝi de tempo al tempo forpafas siajn kugletojn.

La vivon de la abeloj oni povas observi en per vitraĵoj provizita ŝranko. Milojn da diligentaj laboristinoj oni vidas sin okupantaj per la konstruado de la ĉelaroj, la alportado de nutraĵo k.t.p.

Vilaj (harplenaĵ), venenaj migaloj naŭzotremigas (tremigas pro naŭzo) precipe la virinojn (sinjorinojn).

Rimarkindaj estas la promenantaj branĉoj kaj folioj (fasmoj kaj filiumoj). Tiuj insektoj tiom similas al branĉoj, respektive al folioj, ke al la laiko kostas iom da peno por trovi ilin (ke la laiko nur pene povas trovi ilin). Koloro kaj formo ŝirmas ilin kontraŭ hazardaj malamikoj. Pri la diversaj enlandaj kaj ekzotikaj skaraboj, papilioj k.t.p. mi ne parolu; por tio mankas al mi sufiĉe da spaco. Nun al la reptiliejo. Grandaj krokodiloj kuŝas kvazaŭ (ŝajne) mortaj sur la sabla bordo de la lageto aŭ inter la verdo de la folioj. Belegaj tropikaj kreskaĵoj donas al ĉio ensorĉan, pacigan sferon. Sed atentu, jen venas la prizorganto por nutri la skvamhavajn monstrojn. For estas la trankvilo. Fulmrapide, la krokodiloj glitas en la akvon (englitas la akvon) por, interbatalante, kapti la aljetitan vianon. Nun ni povas iom imagi, kiom danĝeraj tiuj bestoj, similaj al kuŝantaj arbotrunkoj kaj apenaŭ en la verdo de la foliaro percepteblaj, povas esti. (Daŭrigota).



## POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen uit deze rubriek zende men vóór de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 11: Vertaal in Esperanto:

De laatste herfstbloom is de klimop. Die begint pas goed te bloeien in November, houdt het meestal uit tot Kerstfeest. De knoppen komen in September al te zien als lichtgroene bolletjes. Die worden al groter en groter en eindelijk worden het ronde massa's van groenachtig gele bloemen, met gele meeldraden<sup>1)</sup> en een stamper<sup>2)</sup> waarop zich zeer veel honing afscheidt. En nu is het heerlijk, om op zo'n mooie Octoberdag te zien, hoe het hongertig insectenvolk op de klimop zijn laatste troost komt zoeken. Ik houd er van om dan eens een uurtje door te brengen boven op de ruïne van Brederode, die begroeid is met de allermooiste klimop van heel Nederland, een reuzelplant met stengels als boomstammen.

1) *stameno*. 2) *pistilo*. Jac. P. Thyssse.

Opgave 12. Vertaal in het Nederlands:

Mi ne neas, ke mi estas mizera terrato. Eble ĝuste pro tio mi raviĝas, vidante havenon, eĉ se ĝi enhavas nur nigran palison kun ligita al ĝi boateto. Iurilate mi preferas havenojn kun fiŝistaj barkoj, ŝipetoj kun mastoj, jardoj, veloj kaj ŝnuregoj, ĉar tio estas la ŝipoj el la sonĝoj, la velŝipoj de aventuraj vojaĝoj....

K. Ĉapek

Skizoj pri Nederlando.

Vertaling van opgave 10.

La grandega 1) disvolviĝo 2) de la rapide frostiga tekniko 3) dum 4) malpli ol 30 jaroj (da tempo) trovas sian kaŭzon 5) en la rapida kresko 6) de la entreprenaro 7) mem. Por akiri 8) pri tio impreson oni direktu sian rigardon precipe 9) al la Unuigitaj Statoj 10). La situacio 11) de la lando progresiĝis 12) tie pli ol ie ajn la disvolviĝon de la rapida frostigo. Oni pensu pri la multaj grandaj urboj kun ilia milionhoma loĝantaro 13), kiu ĉiutage denove bezonas grandegan kvanton da freŝa nutraĵo, dum ke la

Korektoj: vertaling opgave 9, paĝo 68a, 6a linio de supre: *alkroĉiĝas* d.e. *alkroĉiĝis*; 19a linio de malsupre: *pruvo* d.e. *pruvo*; paĝo 69a, 5a linio de malsupre: *iom pli bone atingi* d.e. *tiom pli bone atingi*.

Beoordeeling: L.H.P. en R. 7; P.M.W. en G. 6; C.v.E. en R. 6; J.R. en A. 8; G.A. en R. 7; J.M.T. en D. 8.

lokoj, kie oni produktas 14) ĉi tiun nutraĵon (la agrikulturaj regionoj, aŭ — por la fiŝkaptado — la marbordo) kelkfoje troviĝas je distanco de dekoj ĝis centoj da mejloj.

La transportado, precipe de la fiŝoj, legomoj kaj fruktoj laŭ tiuj distancoj kaj en tiuj kvantoj kaŭzis grandajn malfacil(aĵ)ojn, tial 15) ke oni ofte devis savi sin per pluraj 16) metodoj de konservado. Ĉi tio estas la kaŭzo, pro kiu ekz. 17) la enladskatola konservava industrio en Ameriko tiom prosperis 18). Tamen, ekzistas 19) tre granda diferenco inter la freŝa produkto kaj la enladigita 20). Ĉi tio precipe validas 21) ekz. pri la vitameno C en legomoj kaj fruktoj, de 22) kiu dum la bezonata 23) varmigo por la steriligo perdiĝas granda kvanto.

Drs. C. v. d. Broek.

1) Ook: *ega*, *forta*, *grandioza*, *potenca*. 2) Ook: *kreskado*, *evoluo*. 3) Ook: *de la tekniko pri rapida frostigo*. Liever niet: *rapidfrostigo*. 4) Gedurende de gehele periode, dus: *dum*. 5) Ook: *fonton*. 6) Ook: *prospero*. 7) Bedoeld wordt de gehele bedrijfstak. Ook: *industribranco*, *industrio*. Niet: *metio*, *profesio*. 8) Ook: *ricevi*. 9) Ook: *ĉefe*. 10) O.i. is „Unuigitaj” te verkiesen boven „Unuigitaj”, daar men immers „unuigis la ŝtatojn”. Ook: *Usono*. 11) Ook: *stato*, *karaktero*. 12) Ook: *favorigis*, *akcelis*. 13) Niet: *milionpopolo*, *milionloĝantaro*, *milionaj loĝantoj*. De verklaring is: *loĝantaro (popolo) de milionoj da homoj*, dus: *milionhoma popolo*. Ook: *milionoj da loĝantoj*. 14) Ook: *fabrikas*, *kulturas*; *la lokoj produktantaj*. 15) Ook: *tiel ke*. 16) Ook: *diferencaĵ*, *diversaĵ*. 17) Ook (voluit): *ekzemple*. 18) De uitdrukkingen „zijn toevlucht nemen” en „een hoge vlucht nemen” kunnen alleen maar naar de betekenis worden vertaald. 19) Ook: *estas*. „Wel” wordt niet vertaald. 20) Ook: *(enlada) konservita*. 21) Ook: *konzernas la vitameno* C. 22) Ook: *el*. 23) Niet: *necesa*. (Dum la varmigo, kiun oni bezonas por la steriligo).

Iu fervora studento atentigas nin pri la fakto, ke la vorto „vitameno” ne troviĝas en P.V. sub la koncerna loko, sed ke sub „beribero” kaj „skorbuto” estas trovebla la vorto „vitamino”. Ni dankas pro la atentigo pri tiu manko en P.V., kiun ni aŭdis jam plurfoje. Ne sciante pri la apliko de la vorto „vitamino” en P.V., ni menciis la ofte uzatan formon „vitameno”. Sajnas al ni, ke ekzistas nenia skrupulo kontraŭ la formo en P.V.

Beoordeling: A. te R. 5; P. te R. 6; R. te A. 7; W. te Gr. 4; L. te G. 8; D. te Z. 5; Astor 6; T. te D. 7.

## TRA NIA LITERATURO

### LA BATALO DE L' VIVO

Charles Dickens; tradukis el la germana lingvo L. L. Zamenhof

Tria eldono 1946a

Per tio ĉi mi celas doni formon al demandoj, kiujn estigis por mi lingvouzajtoj trovataj en la nomita traduko. Legantoj bonvolu ne kondamni min kiel arogan kritikulaĉon, kiu volas pliblaniki perfektan lilion aŭ, pli proze, plibonigi en arto aŭ senco ian laboraĵon de la Majstro sen sufiĉa kaŭzo.

La tradukon Zamenhof faris laŭ germana traduko en 1891a, do iom frue en nia historio.

Jam en la unua linio mankas traduko de la vorto „stalwart” antaŭ „England”. Supozinde ĝi ne staras ankaŭ en la germana traduko, kio estus, milde dirite, nepardonebla preterlaso en verko celanta redonon de originala teksto. Tia ekzemplo ne staras sola.

Tra la libro la junulinoj estas nomataj „la pli juna, la pli maljuna”. Kial ne „la pli juna, la malpli juna”, ĉar ne kongruas ĉe tiaj junebelaj estaĵoj la nocio „maljuna”?

Kelkfoje Z. uzis „la via”, malgraŭ la malplaĉo al s-ro Butler, kiu rigardas kiel necesan „la” antaŭ poseda pronomo.

Estas almenaŭ 19 „balanci(s) la kapon”. Laŭ „Plena Vortaro” „balanci la kapon” indikas jesecon; „skui la kapon” neecon, sed Z. ĉe la ekzemploj preskaŭ senescepte uzis ilin klare en senco nea.

Kelkaj notoj pri la traduko:

„Kial ni devas *jus* nun paroli pri li?” (*ĝuste nun?*) (paĝo 18a). „Miksís (*hirlis*) sian teon” (27). „Kion vi diros al (*pri*) tio ĉi?” (28). „Ĉerka tono” (*grafstem*, red.) (30). „Mi ne estis, mi esperas, tro maljusta” (32). Per tio ni lernas, ke ne estas necese uzi formon: *Mi esperas, ke mi ne...* „Per la dua mano ŝi tenis ĉirkaŭprenite sian fratino” (37). „Ŝi ridis kaj ploris miksite” (116). „La senkonscia fingro de konfuzitaj klientoj” (41). „Centojn da funtoj da sterlingoj” (*centojn da funtoj sterlingaj?*) (45). „Vi ne estas necesigitaj miksi vin en...” (*ne estas necese, ke vi miksu vin en...*) (47). „Romanaj (*romaneĉaj*) cirkonstancoj” (48). „Mi ne povas alie” (57); malofta uzo de „povi”; germanismo. „Min okupadas je la literaturo” (63). „Se S. entute (*efektive*) havas konsciencojn” (77). „En vero”; „la advokataĵo (*juro?*) entute” (54). „En la floro de la jaroj”; „oni lin vidis vagantan kaj insultantan (*vaganta kaj insultanta*)” (94). „Brilo de juneco” (104). „Donu al mi kison, mal-

juna” (88). „Tagoj el (*de*) elekto” (117). „Per(*pro*) kraketado ne penetris ĉe vorteto” (104). „Tuŝanta pentraĵo” (86). „Jejuri” (106).

Z. uzis saman vorton apude en frazo, jene: „C. sidis apude apud (*ĉe*) skribotablo” (42). „Se vi volas doni... ne malhelpante al vi al via teo, mi estos al vi tre danka” (94). „Kaj ekster tio, ĝi estas ekster la urbo” (101).

„Ŝi (la infaneto) havis nenian konkurantino... kaj sur kies (*ŝiaj*) lipoj ŝia (la patrina) nomo nun sidis” (104).

Almenaŭ sesfoje Z. uzis „kvazaŭ” kun kondicionalo; sesfoje kun verbotempo. Komparu: „kiel se li estus” (96); „li suprensaltis, kiel volante... (kvazaŭ li volus)” (83); „kiel oni rigardas sur fajron” (*kvazaŭ oni rigardus sur fajron?*) (95). Estas strange, ke Z. kontente povis uzi „elrigardi” anstataŭ „aspekti”, sed ne hezitis antaŭ uzo de „mahinacioj”, „iluminacio”, „tiralojoroj” kaj similaj strangajtoj, vortoj eviteblaj per pli facile diveneblaj formoj.

La traduko estas netakseble riĉa trezorujo de la Zamenhofa lingvouzo, sed kiel redonilo de la senco kaj formo de la verko de Dickens ĝi enhavas multajn signojn de malkompleta kompreno (vidu nur p. 49an) kaj ne meritas la epiteton „perfekta”. Ni rajtas supozi, ke la germana traduko, kiun Z. uzis, ankaŭ estis iom manka. Kiu faris ĝin, tiu restas ankoraŭ nekonata. Pli ol unu germano, supozinde, provis traduki „La Batalo de l' Vivo”.

Principe estas bone, ke ordinaraĵoj traduku nur verkojn el la gepatra lingvo. Por la lingvistoj-superhomoj eble tiu principo ne absolute validus. Zamenhof scipovis kelkajn lingvojn, sed ne egale bone. Lia gepatra estis la rusa. „La Batalo de l'Vivo” li tradukis nur por konvinki sinjoron, ke li povas fari la germanan tradukaĵon en Esperanton.

Ŝefo kaj Lawrence asertis, ke la germana traduko estis bonega. Tio povas esti. Mi nur esprimas konvinkon, ke pli fidinda tradukaĵo rezultus, se la verkon tradukus laŭ la originala teksto iu angla vortmajstro, kiu funde scias la du lingvojn kaj jam liberigis el la katenoj de sialingvaj idiotismoj.

Oni scias la historion de tiu redaktoro, kiu iam decidis eldoni libron absolute pura de ĉia eraro tipografia. André Gide ĝin rakontis. La libro — „Les Aventures de Telemaque” — okupis la laboron de armeeto da korektistoj, kies devo estis forpeli la presararojn. Post multmultaj revizioj, la redaktoro presi-

## DE EXAMEN-VAKKEN

### 4. DE VERTALING NEDERLANDS— ESPERANTO.

Dit is wel het onderdeel van het examen, waarop de candidaat zich het allermeest dient voor te bereiden. Bij de mondelinge vakken kan zenuwachtigheid hem parten spelen, en kan hij zich zo gemakkelijk vergissen of verspreken; bij het schriftelijk werk is hij over het algemeen veel rustiger en heeft hij ruimschoots gelegenheid tot nadenken en kan hij eventuele fouten nog verbeteren. Bovendien weet iedere candidaat heel goed, dat deze vertaling van groter belang is dan die in het Nederlands.

Maar ook om een andere reden is het schriftelijk werk belangrijker dan het mondelinge. Als de punten voor dit laatste toegekend enige twijfel laten aan de bekwaamheid van de candidaat, dan is daar het schriftelijk werk, dat die twijfel kan opheffen, ten goede of ten kwade, d.w.z. in het voor- of nadeel van de betrokkene. Laat men dit toch vooral beseffen: van de mondelinge vakken blijven alleen de pupten als bewijsmateriaal over; van de schriftelijke daarenboven ook het werk zelf. Dit kan a.h.w. een „corpus delicti” tegen de candidaat worden! Reden te meer voor de deelnemer om er zorg voor te dragen, dat dit bewijsstuk altijd in zijn voordeel getuigt. Maar, helaas, als de examiner het schriftelijk werk onder ogen krijgt, en vooral de vertaling in Esperanto, dan moet hij zich telkens en telkens weer verwonderen over de lichtvaardigheid van vele kandidaten, die zich naar het examen hebben begeven zonder zich daarvoor voldoende te hebben voorbereid. Velen van hen blijken zelfs de meest eenvoudige taalregels niet te kennen.

Is er dan zoveel nodig om deze vertaling naar behoren te kunnen maken?

Neen, alleen de regels van uw leerboek, want bijzondere moeilijkheden, die in het leerboek onbesproken blijven, komen in de opgave nooit voor. Verdiept U dus niet in allerlei grammaticale gevallen van ondergeschikt belang, die U van de hoofdzaken zouden kunnen afleiden, maar zorgt er alleen voor de regels van het leerboek te kennen. Wij behoeven die niet een voor een te noemen, maar, daar sommige meer studie en taalinzicht eisen dan andere, willen we er toch enkele van naar voren brengen.

gis la volumon kaj frojis la manojn pro kontento, ĝis subite li ekvidis, ke la antaŭa kovrilparto surhavas, en literoj grandiozaj, titolon „Les Aventures de Telemarque!” Similan ĉagrenon devis

Daar is als eerste zeker de z.g. vierde naamval, Zorgt, dat ge een eenvoudige zin kunt ontleiden, zodat het voorwerp altijd herkend wordt. En houdt dan rekening met de voorzetsels, die geen n verdragen, uitgenomen de richtings-n. Over de naamvals-n mag bij U geen twijfel bestaan. U kent hem, of U kent hem niet; en een twijfelgeval betekent, dat U hem niet kent. Zo'n twijfelgeval weten sommige kandidaten handig te camoufleren met een haaltje, dat zowel een n als een uitloper van de voorgaande letter kan zijn. Iedere candidaat die in de verleiding komt zo'n haaltje te maken, bedenke dus, dat niet hij de uitvinder ervan is, maar dat velen vóór hem dit al geleverd hebben.

En dan: de werkwoordsvormen. Schrijft toch geen samengestelde vormen, waar ze niet horen. Vertaalt bijv. „heb gewerkt” niet met „estas laborinta” maar met „laboris”. Denkt ook aan voorwaardelijke en aanvoegde wijs!

Verwart geen bijvoeglijke naamwoorden met bijwoorden, en zorgt er voor de onderscheidene deelwoorden uit elkaar te houden: bedrijvende en lijdende; zelfstandige, bijvoeglijke en bijwoordelijke; tegenwoordige, verleden en toekomstende.

Iedere studerende heeft bovendien zijn eigen moeilijkheden. Wat de een niet de minste moeilijkheden oplevert, is voor de ander een voortdurend struikelblok. Als ge uw zwakke zijde kent, doe dan uw uiterste best die te overwinnen.

Wil men zich met zorg voor dit examen-vak voorbereiden, dan oefene men zich van tevoren in het vertalen van eenvoudige stukjes uit een krant of boekje. Om Uzelf te kunnen corrigeren, neemt ge daarvoor een stukje in Esperanto, vertaalt dat in het Nederlands en daarna terug in Esperanto. Dit geeft u gelegenheid gemaakte fouten te overwegen. U leert dan ook uw zwakke punten kennen en kunt die nog extra bijwerken.

Bedenkt, dat om goed te kunnen vertalen veel oefening nodig is. Bedenkt ook, dat elke gemaakte fout het bewijs is, dat U een bepaalde regel nog niet voldoende kent. Ziet dus telkens weer Uw leerboek daarvoor in.

En tenslotte: weet U, dat er een prachtwerkje bestaat zowel voor de A- als voor de B-candidaat? Het heet *Examen doen*. Kent U het niet, bestelt het dan direct!

sperti la kompatindaj eldonintoj de la 3a eld. de „La Batalo de l' Vivo”, ekvidante sian „Zamenhoff”.

J. R. Banham, red. „La Rondo”, Melbourne, Australio

## DE WERKWOORDEN

### VERHOUDING TOT ONDERWERP EN VOORWERP.

#### 5. Directe en indirecte rede.

Bij de onderwerps- en voorwerpszinnen onderscheidt men in het Nederlands, zo wel als in Esperanto, twee vormen: de rechte (directe) en de afhankelijke (indirecte) rede. De directe rede geeft een feit of geval weer precies zoals dit waargenomen, gevoeld of geuit wordt, dus zonder toevoeging of wijziging van enige woorden. De afhankelijke vorm stelt dit feit of geval afhankelijk van de hoofdzin, waarmee het door een voegwoord wordt verbonden. De vorm ondergaat in het Nederlands en in Esperanto bepaalde wijzigingen, die echter in beide talen niet gelijk zijn. In Esperanto worden alleen die wijzigingen aangebracht, die de logica eist. In het Nederlands zijn die wijzigingen van bepaalde taalregels afhankelijk en geenszins van de logica.

Bezien we als voorbeeld enkele Nederlandse zinnnetjes:

Rechte vorm:

*Bedenk: de tijd is kort. Hij riep: „Kom direct bij mij!” Ik waarschuw je, plaag die hond niet!*

Afhankelijke vorm:

*Bedenk, dat de tijd kort is. Hij riep, dat ik direct bij hem moest komen. Ik waarschuw je, dat je die hond niet plaagt! Men ziet dan, dat de rechte vorm de zin weergeeft, zoals ze geuit werd: Ik schreef hem: „Kom morgen bij mij!” en dat de afhankelijke daarvan verschilt door 1e, het weglaten van dubbele punt, aanhalingsstekens en hoofdletter van de bijzin; 2e, het gebruik van een voegwoord (hier *ke*); 3e, een andere woordschikking (*kom morgen bij mij — hij morgen bij mij moest komen*); 4e, een andere werkvorm (*kom — moest of zou komen*); en 5e, toevoeging — eventueel wijziging — van een onderwerp (*hij*).*

Hiermede vergelijkte men de Esperantovormen:

Rechte vorm:

*Pripensu: la tempo estas mallonga. Li vokis: „Tuj venu al mi!” Mi avertas vin, ne incitu tiun hundon.*

Afhankelijke vorm:

*Pripensu, ke la tempo estas mallonga. Li vokis, ke ni tuj venu al li. Mi avertas vin, ke vi ne incitu tiun hundon.*

Hierbij merkt men op, dat in Esperanto de woordschikking onveranderd blijft, en — en dit is voor ons van het meeste belang — dat wijze of tijd van het werkwoord in de bijzin dezelfde blijft als die

in de directe rede.

Om vast te stellen, welke wijze of tijd in Esperanto gebruikt moet worden, is het dus beslist noodzakelijk zich de zin eerst in de directe rede voor te stellen. Niet altijd is dat voor ons even gemakkelijk, omdat de directe rede in het Nederlands in hoofdzaak gebruikt wordt bij het weergeven van gesproken of geschreven woorden; in andere gevallen past men als regel de indirecte rede toe; in onderwerpszinnen bijna uitsluitend de indirecte rede. Het is dus nodig zich van die Nederlandse gewoontes los te maken. De onderstaande voorbeelden zullen een en ander wel verduidelijken:

Indirecte rede met tussen haakjes de directe:

*Ik zie, dat het ongeluk gebeurt. (Ik zie: het ongeluk gebeurt).*

*Ik zag, dat het ongeluk gebeurde. (Ik zag: het ongeluk gebeurt).*

*Ik zie, dat het ongeluk gebeurd is. (Ik zie: het ongeluk is gebeurd).*

*Ik zag, dat het ongeluk gebeurd was. (Ik zag: het ongeluk is gebeurd).*

*Ik zie, dat het ongeluk zal gebeuren. (Ik zie: het ongeluk zal gebeuren).*

*Ik zag, dat het ongeluk zou gebeuren. (Ik zag: het ongeluk zal gebeuren).*

Evenzo, doch veelal nog lastiger, in onderwerpszinnen:

*Het schijnt me toe, dat hij gelijk heeft. (Het schijnt me toe: hij heeft gelijk).*

*Het scheen me toe, dat hij gelijk had. (Het scheen me toe: hij heeft gelijk).*

Bij het vertalen neemt men dus de directe rede als basis voor de indirecte. Het werkwoord *okazi* in de eerste zinnnetjes wordt dus in beide vormen vertaald resp. met *okazas, okazas, okazis, okazis, okazos, okazos*. Men bega dus vooral niet de veel gemaakte fout een Nederlands voltooid verleden tijd met *estis -inta* te vertalen, maar met *-is*, dus: *ik zag, dat de boom gevallen was = mi vidis, ke la arbo falis*.

Dem.: Kiel ni traduku „heemkunde”?

Resp.: Bona traduko ŝajnas al ni „hejmlandscio” (aŭ „-kono”; uzo de „scio” aŭ „kono” dependas de personaj preferoj). Al „hejmland” en tiu nomo oni atribuu ne la signifon de lando, ŝtato, patrio aŭ io simila, sed nur de regiono, en kiu oni naskiĝis aŭ sentas sin hejme. Oni ja sentas, ke malgraŭ tio „land” ne estas anstataŭigebla per alia radiko, kaj la radiko „hejm” sola havas en Esperanto jam tro limigitan signifon.

